SAT eH
Izquierda y Esperanto
SAT-en-Hispanio

# INFORMILO


**Numero 13/eo**
**Marto 2010**

## “LABORISTAJ KRONIKOJ” EN LA HISPANA LINGVO

Post longa naskoprocezo, estis ĵus publikigita la libro *“Crónicas del movimiento obrero esperantista”*, traduko, kun malgrandaj modifoj kaj ĝisdatigoj, de la verko *“Laboristaj Kronikoj”*, de Antonio Marco Botella, origine eldonita en Esperanto fare de *SAT-Broŝurservo*. Pri la eldono zorgis nia asocio “Izquierda y Esperanto – SAT en Hispanio”, kun la financa helpo de Fundación Esperanto, kiu jam posedas longan sperton pri la apogo al tiu ĉi tipo de projektoj.

Ni ĉisekve ĉerpas paragrafojn de la enkonduko al la unua libro, verkita de la aŭtoro, kie li priskribas la ekigon de la verko kaj komentas la gravecon de ĉi tiaj iniciatoj.

> Mia generacio, la homoj naskiĝintaj je la komenco de la jaroj dudekaj de tiu ĉi jarcento, tiuj kiuj batalis en la hispana intercivitana milito, suferadis la hororojn de terura ekzilo kaj ankoraŭ pli terura hispana postmilita diktaturo, tiuj homoj estas ja ĉe la sojlo de absoluta malapero...
>
> Mi estas unu el la raraj specimenoj de tiu generacio proksima al estingiĝo, ankoraŭ vivanta kaj superinta mil kaj unu danĝerajn provojn, pli-malpli kiel kelkaj e1 miaj kompanoj. Kaj kredu min amikoj, mi tion diras sen timo, sed ankaŭ ne kun fiero aŭ aroganta sinteno. Tiu densa vivo, sekvo de kompleksaj politikaj cirkonstancoj, estis motivo pli o1 sufiĉa, por ke ne malmultaj el miaj amikoj ofte min demandis/as, kial mi ne verkas originale en Esperanto pri la laboristmovada historio. Tio kaj la spertoj kiel esperantisto, antaŭ, dum kaj post la intercivitana hispana milito, apartenas kaj estas en intima rilato al la historio de nia Movado. Ekzistas kvazaŭ devo atesti pri tiuj eventoj, sed mi dubas ĉiam pri mia kapablo tion fari tiel digne kiel la temo meritas kaj mi deziras. Sed koro de esperantisto ampleksas universojn, kaj tio ofte donas al ni la sufiĉan kuraĝon por superi niajn proprajn hezitojn.




> Cetere, elvoki tiajn viverojn el pasinto ne povas esti agrabla, fakte amarigas sentivan homon. Doloras ĉiam. Kaj pri tiu sento kulpas tiu longa miliono da mortintoj, unu en ĉiu hispana hejmo, inter kiuj certe oni povas kalkuli kelkajn el niaj plej estimataj amikoj, kaj eble eĉ mian plej amatan fraton. Ja vundo, kiu neniam fermiĝis. Neniam fermiĝos...

(...)Verkoj pri la intercivitana hispana milito abundas en ĉiuj lingvoj, sed neniu rilatanta viverojn de esperantistoj, neniu pri homoj pacemaj, kiuj devis decidi en la interno de si mem, ĉu oni devis akcepti kaj rnem uzi perforton inter homioj. Verko pri iliaj pensoj kaj reagoj en tiuj transcendaj tagoj, kiam mondmilito kaj profunda krizo de humanaj kaj ideologiaj valoroj minacis niajn homamajn konvinkojn kaj eĉ nian civilizacion.

Iom post iom la ideo pri tiu verkado venkis ĉiajn barojn, eble eĉ tiun ĝeneralan kvazaŭ timon de la esperantistoj verki pri historiaj temoj. Kaj fine venis mia decido favora al la verkado de ĉi tiuj paĝoj, kaj ne nur pri tiuj dramaj eventoj de la intercivitana hispana milito, sed precipe pri tiuj nepre plektitaj al la protagonismo de laboristoj esperantistaj, kiel parto nedisigebla de la Laborista Esperanta Mavado kaj kies originoj ankaŭ ne mi devis forgesi. Cetere, ekzistas en la vicoj de tiu specifa Movado speciala sentiveco, idealismaj karakterizoj, propra percepto pri la fenomeno Esperanto, kiuj nepre postulas la ekziston de aparta historio, kun paĝoj, kies enhavo esprimas alian legon, alian interpreton, pli profundan signifon ol tiun de la ordinara teksto.

Rilate al la originala versio de la verko en Esperanto, troviĝas en tiu ĉi eldono kelkaj ŝanĝoj kiuj fariĝis nepraj. Unualoke, la fotografaĵoj, kiuj en la antaŭa versio ne atingis en ĉiuj kazoj sufiĉan kvaliton. Oni ankaŭ pritraktas kun detalo kelkajn figurojn de la laborista esperanta movado. Krome, oni aldonis kelkajn lastajn eventojn, kvankam oni preferis ne insisti pri la lastaj okazintaĵoj, kiujn oni lasas por la juĝo de postaj historiistoj.

La libron oni povas akiri pere de nia Libroservo libroservo@gmail.com

# VENONTAJ RENKONTIĜOJ

Dum venontaj monatoj kaj semajnoj ne mankos la ŝancoj por paroli en Esperanto, por kunveni, labori, agadi kaj sin amuzi utiligante la universalan lingvon. Jen kelkaj ekzemploj de rendevuoj kie SATeH aŭ parto de iliaj anoj kunlaboros aŭ partoprenos.

## KONGRESO DE SAT-Amikaro

Nia frata asocio *SAT-Amikaro* (la grupo kun rilatoj kun Sennacieca Asocio Tutmonda, SAT, por la franclingva komunumo), celebros sian jaran renkontiĝon inter la 3-a kaj la 6-a de aprilo. La elektita loko estas Hillion (*Hiliono*), ĉarma duoninsulo en la golfeto de St Brieuc, en departemento de Côtes d'Armor, Bretonio.




Pliaj informoj en: http://www.esperanto-sat.info/rubrique134.html

## JUNULARA IBERIA RENKONTO

Dum la lastaj jaroj fariĝis tradicia la celebrado de renkontiĝo alterne organizita de la Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS), Portugala Esperantista Junularo (PEJ) kaj Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ). Ĉi jare la renkontiĝo okazos en Almagro, en la hispania provinco de Ciudad Real, kunlabore kun la Esperanta Manĉa Societo (EMAS).

La datoj estos la 9-a ĝis la 11-a de aprilo, kaj SATeH partoprenos per la organizado de la Libroservo.

Pliaj informoj: http://www.esperanto.es/iro2010

## MONDAJ KONGRESOJ EN KUBO

Dum tiu ĉi jaro 2010 la Universala Esperanto-Kongreso okazos en Kubo, de la 17-a ĝis la 24-a de julio. La sidejo situos en la ĉefurbo Havano.

http://www.uea.org/kongresoj/uk_2010.html

Ankaŭ en tiu ĉi lando disvolviĝos la Internacia Junulara Kongreso (24-31 julio 2010 en Los Cocos), kaj la Konferenco de ILEI (11-17 julio 2010 en Matanzas).

## KONGRESO DE SAT

La 83-a Kongreso de *Sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT) okazos en Braşov (Braŝovo), Rumanio, de la 1-a ĝis la 6-a de aŭgusto de 2010. En nia venonta *Informilo* aŭ pere de nia retejo ni plu detaligos la informojn dum venontaj monatoj.

La Programo kaj la praktikaj kondiĉoj estas konsulteblaj en:

http://www.satesperanto.org/-SAT-Kongreso-2010-.html

## INTERNACIA SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

La 18-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo.okazos de la 2-a ĝis la 9-a de oktobro de 2010 en Coma-Ruga, provinco de Taragono, Katalunio, organizita de grupo de kompanoj de la Kultura Asocio Esperantista (KAE).

Pliaj detaloj en:

http://personales.ya.com/semajno/

# ESPERANTISTAJ KULTURCENTROJ

Kontraŭe al la antaŭaj esperigaj informoj pri la esperantistaj renkontiĝoj, ni devas transdoni malĝojan informon pri alia faceto de nia kultura vivo, kiun sendas al ni la kamaradoj de SAT-Amikaro.

La du kulturaj esperantaj centroj en Francio travivas grandajn malfacilaĵojn. De kelkaj jaroj, ili frontas almenaŭ unu similan problemon: malkresko de la partoprenantoj en la staĝoj. Malabundis la vizitantoj en la du kulturcentroj de Francio, t.e. Greziljono kaj Kvinpetalo.

En novembro disvastiĝis alvoko por helpo kaj partopreno. Laborgrupa kunveno pri tiu ĉi temo estas antaŭvidita dum la venonta SAT-Amikara kongreso.

# MUZIKAJ NOVAĴOJ

» ***Surplacen venu vi*** estas la nova disko de la grupo Kaj Tiel Plu, bazita en Katalunio, kiu ludas tradician muzikon, el la folkloro de diversaj landoj, tradukita en Esperanton. Temas pri la tria albumo, proponanta vojaĝon al la muzikoj de la mondo, kaj kun atento al la danceblecoj de la pecoj selektitaj.

# LA SINDIKATO CGT APOGAS ESPERANTON

Rezolucio unuanime aprobita de la 9-a Kongreso de la sindikato CGT de Katalunio la 7-an de februaro de 2010

**Rezolucio**

La 9a Konfederacia Kongreso de la Ĝenerala Konfederacio de la Laboro en Katalunio,

* Atentinte la urĝan bezonon de plena internacia kooperado de la liberecanoj en la batalo kontraŭ la kapitalismo,

* Atentinte ke tiu kooperado nepre estu regata de la procedoj de la rekta demokratio kaj ke tiu ĉi eblos nur per la uzo de komuna internacia lingvo,

* Atentinte ke ne eblas, ke tiu ĉi komuna lingvo estos iu nacia lingvo, unue kaŭze de la malfacilaĵoj por la plejmulto el la laboristoj lerni naturan lingvon, due kaŭze de la kompara ofendo, kiu estus la fakto, ke parto el la movado uzus kiel komunan lingvon sian propran denaskan lingvon kaj alia parto lingvon nur duonlernitan, kaj fine kaŭze de la ideologiaj problemoj generotaj de la ebla uzo, kiel tian komunan lingvon, de iu el la nun hegemoniaj koloniismaj lingvoj,

**Decidas:**

1. Deklari la Internacian Lingvon Esperanto kiel la nuntempe plej taŭga por la starigado de horizontalaj kaj egalecaj rilatoj inter la laboristoj de la tuta mondo kaj inter la liberecanaj organizoj.
2. Kuraĝigi ĉiujn organojn de la ĜKL/CGT por ke ili stimuligu la disvastiĝon kaj lernadon de la Internacia Lingvo inter siaj gealiĝintoj kaj amikoj.
3. Proponi al ĉiuj liberecanaj organizoj la stimuligon de la esperantolernado, cele al ebligi la uzadon de esperanto kiel laboran lingvon en la kunordigado de la internacia liberecana movado..

Lleida, la 7an de februaro de la 2010-a

.

Forpasis nia kompano Manuel Suárez. Malnova anarkiista batalanto, li membris dum pluraj jardekoj en SAT, dum sia ekzilo en Francio, kaj post la reveno al la hispania sudo. Manuel, *ripozu en paco!*

---

**Por kontakti kun ni:**

**SAT-en-Hispanio (Asociación Izquierda y Esperanto SATeH)**

Poŝtokesto 8537, ES-28080 – Madrido (Hispanio)

esperanto@nodo50.org

**http://www.nodo50.org/esperanto/**